

Kunveno per Zoom – 18a de marto, 2019: 20h00 UTC

Temo: ILEI-kongreso, Nitobe, LangFest 2020

Partoprenantoj: Universitata Laborgrupo: Angela Tellier (ESF), Radojica Petrović (ILEI-estrarano pri kongresoj), Vicente Manzano-Arrondo (ILEI), Ivan Colling (ILEI), Elisée Byelongo, Renato Corsetti (ILEI), kaj Karina Oliveira (TEJO / ILEI).

Mark Fettes (UEA / ESF / CED), Mireille Grosjean (ILEI), Suzanne Roy (ILEI / LKK de UK).

Atentigoj:

- Kunlabori donas okazon rekoncepti Nitobe (MF).
- Ilona Koutny atentigis ke aranĝo pri interlingvistiko je la fino de la kongreso kolizius kun aranĝo en Pozan (MG), sekve ŝi ne povos partopreni.
- TEJO kunvenos en Nederlando (du semajnojn antaŭ la UK).

Konferencdatoj kaj lokoj:

- La **ILEI-kongreso** okazos en Kebekurbo antaŭ la UK.
- **Nitobe** okazos post la UK en Universitato de Montrealo.
- **LangFest** okazos paralele kun Nitobe.

Temoj:

- **ILEI-kongreso** - por nun, kandidatas la temoj:
 - Interlingvismo en la informteknologia epoko: paradigmoj, defioj kaj atingoj
 - Interlingvistiko: defioj kaj atingoj
 - La diverseco kaj tutmondiĝo de pedagogiaj paradigmoj
aŭ alia temo rilata al Esperanto kaj interlingvistiko en universitatoj
Ĉiukaze, la ILEI-kongresa temo signifas subtenon al la klopodoj de la universitata laborgrupo kaj akcelilon de la universitata agado ĝenerale.
- **Nitobe:** lingvo politiko, 75-jariĝo de UN, lingva diverseco (depende de trovo de subtenaj partneroj)

> Oni prefere ne elektu tro similajn temojn por kuraĝigi homojn partopreni en ambaŭ konferencoj.

> MF faros la unuajn paŝojn rilate al Nitobe, kaj tenos la universitatan grupon informita.

> MG kaj RP informos pri la elekto de temo por la ILEI-kongreso.

Pri-universitata agado:

> Oni iomete diskutis pri restukturigo de universitata agado (CED, ESF, ILEI, UEA) – nenio konkreta proponita krom la konstato, ke ne plu aktualas la iama intenco fondi komunan universitatan komisionon de UEA/ILEI.

> Ĉiu agnoskis ke ILEI havas la rajton (kaj devus) okupiĝi pri universitatoj same kiel pri lernejoj, inkluzive de okupiĝo pri interlingvistiko.

> UEA observas kaj sekvas la laboron kaj iniciatojn de la universitata laborgrupo.

Venontaj tagorderoj:

EB menciis okazigi konferencon / kongreson en Sud-Afriko. RP petis lin prezenti planon, aŭ ideojn de la loka E-aktivularo en Kaburbo pri kion ili celas kaj kredas povi organizi, kiel, kiam kaj kun kia helpo el la E-komunumo ekster Kaburbo. AT aldonu tion ĉi al venonta tagordo.

VMA (antaŭ la kunveno) parolis pri atestiloj – AT aldonu al venonta tagordo.